# Kruĉo de saĝo



## Movado sen Nomo

*30 jaroj da agado*

*1980 - 2010*

**Titolo**: Kruĉo de saĝo

**Aŭtoro**: Movado sen Nomo kaj membroj

**Eldonisto**: Movado sen Nomo
Frankrijklei 140
2000 Antwerpen

**Pri kopirajto**: Ĉiu ajn rajtas fari kopion aŭ tradukon, citi, mencii, kaj tiel plu por nekomercaj celoj. Simple, bonvolu sendi unu ekzempleron al ni por nia arkivo.

# Enkonduko

*Paŭzo!*

*Ne tro kuru! Kiam vi kuras, vi ne vidas la belaĵojn ĉirkaŭ vi!*

*Haltu foje. Kiam vi bezonas tempon por spiri, por pripensi kiel solvi problemon, por retrovi energion, eksidu trankvile, eĉ dum vi ne vere havas tempon. Malplenigu la ĥaosan kapon por fari freŝan spacon. Nur trankvila akvo estas klara, travidebla, serena.*

*Tiu ĉi libreto celas doni inspiron kaj konsilon, kuraĝon kaj alian vidon sur ĉiutagaj aferoj. La tekstoj estas ankaŭ invito al medito kaj memreflekto.*

*Samtempe ĝi donas superrigardon pri nia jam 30-jara agado, sendante mesaĝojn tra la tuta mondo, al ĉiuj kontinentoj, tute sen aliĝkotizo.*


*Ĉio ĉi danke al donacoj de niaj membroj kaj subteno de nia gepatra asocio Bond zonder Naam. (Organizo en Belgio kun samsencaj nomo kaj agadoj, sed en la nederlanda lingvo.)*

*Ni deziras al vi multan legoplezuron kaj esperas ke tiu ĉi libreto povas esti fonto de inspiro al vi!*

*La teamo de*
*Movado sen Nomo*

## Iom da historio

Jam en 1938 iu pastro Henri De Greef fondis en Nederlando asocion kun la nomo *Bond zonder Naam* (Movado sen Nomo).



En 1957 Phil Bosmans (vidu foton), katolika pastro en Belgio, ricevis la taskon okupiĝi pri fondo de *Bond zonder Naam* en Belgio. En unu jaro li havis 20.000 interesitojn.

Lia baza ideo estis ke en la moderna socio, oni havas tro multe da atento por strukturoj, por tekniko kaj teknologio kaj emas forgesi la simplajn homajn bezonojn. Tial li emfazis la *Kulturon de la Koro*. Li i.a. atentigis la publikon per la presado kaj dissendado de kartoj, kiuj havas simplan trafan mesaĝon. Li nomis ilin

*levilkartoj* por levi la homan nivelon en la socio. Foje la slogano sur tia karto estis milda, humurplena, foje ĝi estis akra. La strukturo de la movado fariĝis tute volontule : membreco estas senpaga, nura anonco sufiĉas. Sed la aliĝintoj promesas atenti pri la Kulturo de la Koro. Mirige estas ke - sen almozpeti - spontaneaj donacoj ĉiam sufiĉis por kovri la pres- administrad- kaj afrankokostojn. La movado rapide kreskis al 300.000 membroj.

Phil Bosmans rimarkis ke tiu bezono je Kulturo de la Koro estas universala. Lia agado komencis en Flandrio kaj do en la nederlanda lingvo. Sed Bosmans instigis kaj subtenis similajn iniciatojn en la franclingva parto de Belgio kaj eksterlande. Tiel fondiĝis 11 pliaj asocioj, ĉiuj aŭtonomaj.

Bosmans simpatiis kun Esperanto kaj komprenis ke ĝi havas eblecojn por plivastigi la horizonton por la mesaĝoj pri la Kulturo de la Koro. En 1980, nova esperantisto Jos Kerfs, ekkontaktis kun Bosmans. Kune kun du amikoj kaj kelkaj spertaj esperantistoj en Antwerpen, li fondis la 12an sekcion: *Movado*

*sen Nomo*, je la 30a de januaro 1980. *Bond zonder Naam* finance subtenis la starigon. La bazaj principoj restis samaj : senpaga membreco, sed la membroj promesas atenti pri la Kulturo de la Koro kaj eventuale finance kontribuas laŭ siaj deziro kaj ebleco.

La unua slogano, kiu ankaŭ respegulas la esencon de la movado, estis "Plibonigu la mondon, komencu per vi mem". Ekde la komenco, la agado estis en harmonio kun Bond zonder Naam, sed tute sendependa. La sloganoj por internacia publiko estis aliaj ol tiuj por Belgio. La komenca problemo estis malfido de esperantistoj: "senpaga aliĝo... kio kaŝiĝas malantaŭ tio?" Iom post iom tamen, la membronombro kreskis. En 1988 Movado sen Nomo unuafoje aperis en la Universala Kongreso en Roterdamo. Ekde tiam ĝi aperis en multaj UK-j, kelkfoje per informa budo, preskaŭ ĉiujare per informa kunveno, en la lastaj jaroj ankaŭ en angulo de la stando de Monato kaj/aŭ en la stando de fakaj asocioj.

Grava paŝo estis la eldono de traduko de la plej furora libro de Phil Bosmans "Ŝanco por Feliĉo". Esperanto estis la 20a lingvo en kiu ĝi eldoniĝis.

En 1992, unu jaro post lia emeritiĝo el Bond zonder Naam, Bosmans mem partoprenis la UK-n en Vieno. Kvankam li ne konas Esperanton, li senprobleme komprenis la reagojn de la ĉeestintoj en informa kunveno kaj reagis pere de interpretisto.

En 2000, por festi la 20-jaran ekziston, MsN eldonis duan libron de Phil Bosmans, "Donace al vi". En Antwerpen okazis tre etosplena festo kun la aktivuloj kaj en ĉeesto de Phil Bosmans.

La nombro da aliĝintoj kreskis al 1800 en 65 landoj. Ĉiujare alvenas multaj korespondaĵoj de personoj, kiuj esprimas sian admiron kaj aprezon por la senditaj Levilkartoj.

Aliflanke ankaŭ evidentiĝis ke en la adreslisto, kunmetita en 20 jaroj, multaj adresoj iĝis nevalidaj : ni sendis kartojn al personoj kiuj forpasis, translokiĝis, jam ne plu uzis Esperanton, aŭ perdis interesiĝon por la Movado.

Ekde 2003 ni komencis aktualigi nian adresaron kaj restis proksimume 450 perpoŝtaj, konfirmitaj adresoj kaj 200 retaj. Tio estas konsiderinda ŝrumpiĝo de la adresaro. Sed nun ni povas certi ke la kartoj atingas homojn, kiuj deziras ilin.

Pro la alteco de poŝtkostoj (multe pli alta ol la preskostoj), ni decidis ekde 2010 ne plu sendi 4 levilkartojn jare, sed ĉiujare eldoni jarkalendaron kun inspiraj mesaĝoj. La tiel ŝparata mono povas esti multe pli bone uzata por subtenindaj projektoj.

En 1980 aperis 3 levilkartoj:

- Plibonigu la mondon, komencu per vi mem.
- Homo sen difektoj estas homo nenatura.
- Fi-kritikanto, vi sidas sur la bremso!

# Plibonigu La Mondon !!

MOVADO sen NOMO

## Komencu ĉe Vi Mem

En 1981 aperis 3 levilkartoj:

- Plivole mielkora ol betonkapa.
- Grandaj buŝoj tiom malmulte diras !
- Aplaŭdon por simplaj homoj.

plivole

# Mielkora

ol

# BETONKAPA

★ MOVADO sen NOMO ★

En 1982 aperis 1 levilkarto:

- Esperanta homo, ne restu en via domo !




“Esperanta” homo,
ne restu
en via domo!

★ MOVADO sen NOMO ★

En 1983 aperis 3 levilkartoj:

- Ankaŭ vi valoras la penon !
- Indiferentemo : kancero de la sentimento.
- Ali-pensantoj ankaŭ pensas.

# Ali - pensantoj ...




# ankaŭ pensas

☆ **MOVADO sen NOMO** ☆

En 1984 aperis 3 levilkartoj:

- Ridu sincere ! Kiu ne ridas, tiu ne vivas !
- Pesimistoj malpravas.
- Rapidu ! Fulme ! Nun ! Ek ! … Haltu !

(En 1985 ne aperis levilkartoj.)

PESIMISTOJ

MALPRAVAS



☆ MOVADO sen NOMO ☆

En 1986 aperis 5 levilkartoj:

- Spaco por paco.
- Fariĝu homo de amo.
- La vivo estas mallonga, tamen rideto nur prenas unu sekundon.
- Jam sufiĉas la pugnoj, donu la manon.
- Metu vekilon por via konscienco.

(Ĉiuj tiuj ĉi kartoj ĉi-apude estis vere mane eltonditaj laŭ la formo de la mano, fare de niaj volontuloj.)


Jam sufiĉas
la pugnoj ...
Donu
la manon!

En 1987 aperis 3 levilkartoj:

- Floro bezonas lumon, homo bezonas amon.
- Vortoj, vortoj, vortoj… sed kion vi fakte celas diri?
- Plipurigu la mondon, komencu ĉe vi mem.



Floro bezonas lumon
Homo bezonas amon!
☆ MOVADO sen NOMO ☆

En 1988 aperis 5 levilkartoj:




- Flustru vian belon en mian orelon.
- Tiu, kiu konas sin, neniun kondamnas.
- Ŝanco por feliĉo, ankaŭ por vi.
- Kontakto sen takto = fuŝkontakto.
- Dankemo estas la memoro de la koro.

En tiu ĉi jaro aperis ankaŭ la libro "Ŝanco por feliĉo" en Esperanto. La libro originale verkita de Phil Bosmans en la nederlanda lingvo (Menslief ik hou van je) eldoniĝis tutmonde en pli ol 2.000.000 da ekzempleroj. Dulingva slovaka-esperanta versio (Šanca na šťastie) aperis en 2007.



# ŜANCO POR FELIĈO ANKAŬ POR VI!

☆ MOVADO sen NOMO ☆

En 1989 aperis 6 levilkartoj:

- Kondamnu ĉiun antaŭjuĝon.
- Egoistoj ne renkontiĝas, ili kolizias.
- La impertinentuloj posedas la duonan mondon.
- Esti en paco nun, ne ĉe tombo.
- Pretendo, atesto pri stulteco.
- Anstataŭ kritiki, proponu alternativon.

☆ Movado sen Nomo ☆

# Egoistoj ne renkontiĝas.

# Ili kolizias.



En 1990 aperis 6 levilkartoj:

- Armita homo, malpli homo.
- La suno brilas ankaŭ tra etajn fenestrojn.
- Malaperigu ĉiujn egoismojn !
- Pli bona mondo komenciĝas en via propra koro.
- Mi ridas ĉar mi fidas.
- Foraj amikoj / ĉu ankaŭ bonaj najbaroj ?

Pli bona **mondo**
komenciĝas
en via propra **koro**

Movado sen Nomo

En 1991 aperis 6 levilkartoj:

- Pli bone donaci ol preni.
- Se vi kreas malamikojn, vi povas nur militi.
- Mia amikeco estas senpaga.
- Vi plibeliĝas kiam vi ridas.
- Ni vivas nur hodiaŭ.
- Prenu tempon por esti feliĉa.

☆ **Movado sen Nomo** ☆



# Pli bone donaci ol preni...

En 1992 aperis 6 levilkartoj:

- Pardono = plej bela dono.
- Kiam amo magras, oni vidas erarojn grase.
- Gaja mieno : plej varmigas vin.
- Optimistoj vivas pli longe.
- Onidiroj : krestomatio de mensogoj.
- Paco en la mondo : unue en la propra familio.

# paco en la mondo:




## unue en la propra familio

☆ Movado sen Nomo ☆

En 1993 aperis 6 levilkartoj:

- Al mi vi rajtas diri kio mankas.
- Feliĉaj homoj duoble valoras.
- Ne kaŝu vin, kiam mi bezonas vin.
- El la 1a, 2a, 3a kaj la 4a mondoj ni kreu unu mondon.
- Paco en la mondo ne eblas sen interna paco.
- Senperfortemulo, mi admiras vian potencon!



El la 1a, la 2a,
la 3a kaj la 4a mondoj
ni kreu **UNU** mondon!

☆ Movado sen Nomo ☆

En 1994 aperis 6 levilkartoj:

- Eĉ post la plej malĝoja nokto, ekestos nova mateno.
- Bonfari bonfartigas vin.
- Maltoleremo = timo… ke eble la alia pravas.
- Iĝi kolera estas homa, resti kolera estas diabla.
- Homo valoras pli ol mono.
- Bonfar(t) = bonfartigi aliajn.

☆ Movado sen Nomo ☆

# Bonfar(t)i = bonfartigi aliajn

En 1995 aperis 6 levilkartoj:

- Humuro, bona sku-absorbilo en kazo de kolizio.
- Kontenta homo, anĝelo en la domo.
- Por atingi konkretaĵon oni unue revu pri ĝi.
- Ju pli grandas la timo, despli fortas la disigaj muroj.
- Via koro povas esti la plej granda en la mondo.
- Superfluo kondutas al superŝarĝo.




# superfluo

kondukas al SUPERŜARĜO

En 1996 aperis 5 levilkartoj:

- Tiu havas pli multe, kiu donas pli multe.
- Venko kaŭzas malamon ĉar la venkitoj estas malfeliĉaj.
- La valoron de ĉiu homo rekonu.
- Feliĉu ne kondiĉu !
- Vortoj plej akra armilo, plej efika kuracilo.

☆ Movado sen Nomo ☆

# *Feliĉu*

# ne kondiĉu!

En 1997 aperis 6 levilkartoj:

- Hejmo estas pli ol nura konstruaĵo.
- Ĉevalpovo de aŭto ne helpas se azeno stiras ĝin.
- Pri sorto via ne ekploru, pri forto por venki esploru .
- Valoro de rideto.
- Vi organiziĝu.
- Se vi ne povas esti stelo en la ĉielo, estu kandelo sur la tero.


☆ Movado sen Nomo ☆
SE VI NE POVAS ESTI
STELO
EN LA ĈIELO
ESTU
KANDELO
SUR LA TERO

En 1998 aperis 5 levilkartoj:

- Kreu tempon por… silenti.
- Feliĉo estas havi pli da revoj ol la realo povas neniigi.
- Agi anstataŭ plendi.
- Bona homo ĉie estas bonvena.
- Savu vivon de la arbaro por viaj genepoj.


Movado sen Nomo
Savu vivon
de la arbaro
por viaj genepoj

En 1999 aperis 6 levilkartoj:

- Gajeco estas ora manpremo.
- Ĝeneraligoj, aŭtoŝoseo al miskompreno kaj malamo.
- Kara homo, mi amas vin.
- Silento estas evento.
- San (sun)-uloj drogojn ne bezonas.
- Feliĉan jarmilon.


silento
estas evento

En 2000 aperis 6 levilkartoj:

- Kontraŭbatalu korupton kaj malhonestecon.
- Feliĉo ekzistas en memkonscio.
- Bona mondo = pli bonaj homoj.
- Fideleco, homa virto?
- Mi ĝojas ĉar mi vivas.
- Kune ni kreu la estontecon.




Aperis ankaŭ la libro "Donace al vi", denove traduko de inspirigaj tekstoj de Phil Bosmans.


Mi ĝojas ĉar mi vivas
★Movado Sen Nomo★

En 2001 aperis 4 levilkartoj:

- Ne serĉu feliĉon malproksime : ĝi estas en la propra kapo !
- Bonkoreco malfermas korojn.
- Antaŭ ricevo, fasto. Post ricevo, festo.
- Hodiaŭ estas la unua tago de la resto de via vivo. Ĝuu ĝin.


Bonkoreco
malfermas
korojn
★Movado Sen Nomo★

En 2002 aperis 4 levilkartoj:

- Ne ekzistas vojo al amo. Amo estas la vojo.
- Povi ridi estas serioza afero.
- Troviĝas multe da ĉielo sur tero.
- Foje orelo sufiĉas.




# foje orelo sufiĉas...

★Movado Sen,Nomo★

En 2003 aperis 4 levilkartoj:

- Pensu pri : la forto de vorto.
- Ne fuĝu de fuĝintoj.
- Ami estas verbo.
- Atentu por hipopotamoj.


pensu pri:
la FORTO
de VORTO
★Movado Sen Nomo★

En 2004 aperis 4 levilkartoj:

- Por harmonii kun aliaj, necesas unue harmonii en si mem.
- Urĝe malhastu.
- Malbona vetero ne estas bariero.
- Ne estu nur papilio en via familio.


* Movado sen Nomo *
URĜE
MALHASTU!

En 2005 aperis 4 levilkartoj:

- Rigardu la spegulon kaj trovu la 7 erarojn.
- La senco de la vivo.
- Koran dankon pro la subteno !
- La vivo tro mallongas por longdaŭra kolero !

# RIGARDU LA SPEGULON...



# ... KAJ TROVU LA 7 ERAROJN

* Movado sen Nomo *

En 2006 aperis 4 levilkartoj:

- Ni, lernante ĉiam venki, ne scipovas do malvenki.
- Pensu pri la naturo… por via propra futuro !
- Bonvenas komplimento en ĉiu ajn momento !
- Neniam perdu kuraĝon !

*Neniam perdu kuraĝon!*

www.movado-sen-nomo.org

En 2007 aperis 4 levilkartoj:

- Per via oreloj… vi vidas pli !
- Serĉante la bonon de alia, vi trovas la propran.
- La padon faras irado.
- (Movado sen Nomo dankas vin pro via subteno kaj deziras al vi gajajn festotagojn kaj feliĉan novan jaron.)

La padon faras irado.

En 2008 aperis 4 levilkartoj:

- Kial rompi al si la kapon ?
- En ĉiuj lingvoj de la mondo, la ♥ estas la simbolo de amo.
- Bona tago ekas per « bonan tagon ».
- Ĉiu guto gravas.

Bona
tago
ekas
per...

"*Bonan tagon*"



www.movado-sen-nomo.org

En 2009 aperis 4 levilkartoj:

- Ne scias mono pri sano kaj bono.
- Feliĉon oni ne serĉas, oni trovas.
- Forigu viajn katenojn !
- Venkanto estas perdinto kiu persistis.

Ne scias mono



pri sano kaj bono.


www.movado-sen-nomo.org

En 2010 aperis 1 kalendaro kun 4 levilkartoj:

- Ne diru kion vi scias. Sciu kion vi diras!
- Bela mieno = bela vizaĝo.
- Mia koro diras tiktak', ne taktik'.
- Ĉi tie bojas nur hundo!

Mia koro diras tiktak',

... ne taktik'.



## Kiel helpi kaj kunlabori?

**De membroj por membroj:**
Ĉiu ajn estas invitata sendi proponon por sekvonta slogano. Interesa sentenco, proverbo, eventuale kune kun akompana teksto kaj bildo estas ĉiam bonvena.

Ankaŭ redaktoroj de ĉiaj (Esperanto)revuoj kaj retpaĝoj estas invitataj transpreni la sloganojn en siaj revuoj kaj TTT-ejoj. Ĉiuj bildoj kaj tekstoj estas libere uzeblaj de ĉiu ajn.

**Donacoj:**
Dekomence Movado sen Nomo estas asocio kun senpaga membreco, same kiel ĝia gepatra asocio 'Bond zonder Naam'. Ni ne petas kotizojn por ne ekskludi personojn kiuj malfacile povas

kontribui mone.

Homoj kiuj tamen opinias ke ili povas kontribui, eĉ per nur malmulto, estas bonvenaj fari tion, por ke ni povu daŭrigi nian agadon. Ĝuste tiu ĉi sistemo permesas ke ni povas servi ne nur al monhavaj personoj, sed al ĉiuj homoj en ĉiuj mondpartoj de la mondo.

**Manieroj transpagi estas jenaj:**

- per banko el eksterlando: IBAN BE75 9796 0877 6651 - BIC ARSPBE22
- pere de Flandra Esperanto-Ligo: konto mosn-q
- en Belgio pere de Bond-zonder-Naam, kun la mencio "gift MsN" (alikaze la mono iras al la gepatra asocio)

**Movado sen Nomo** (mallonge MsN) serĉas la solvon de homaj problemoj en la kultivado de la plej neglektata kaj la plej neevoluinta parto de la homo: la homa koro!

Ĝi volas:

★ estigi solidarecon inter ĉiuj homoj, grandaj aŭ malgrandaj, riĉaj aŭ malriĉaj, de kiu ajn raso, deveno aŭ religio ;

★ forigi la izolitecon de homoj, redoni al ili la eble perditan kuraĝon, helpi al ili denove ekkredi je la vivo, la propraj eblecoj, la amo, la homo ;

★ pledi por pli da amo, paco, toleremo, justeco kaj respekto por ĉio vivanta kaj defendi ĝin.

Msn kredas, ke en ĉiu homo troviĝas bonecoj. Tiujn bonecojn ni malkovru ! Ni ekserĉu la koron sub la vestoj de ĉiu homo. Tiun koron ni volas "tuŝi" (vivigi) kaj, kune kun tiu homo, ni serĉos novajn eblecojn, vivoĝojon, vivstilon !